(1) nepago de kotizoj, subvencioj kaj kontribuoj, regule petataj fare de la kompetentaj organoj de la Akademio;
(2) kondamno pro komunjuraj deliktoj;
(3) agoj, kiuj serioze ĝenas la ekvilibron kaj ordon de la Akademio.

Art. 22

Kontraŭ disciplinaj decidoj de la Akademia Senato la konceratoj povas protesti ene de 90 tagoj al la Ĝenerala Asembleo, kiu ekzamenos la apelacion dum sia unua kunveno.

Art. 23

La membreco finiĝas, krom en la kazoj menciitaj en art. 21, ankaŭ per malaliĝo kaj forpaso.

Art. 24

La perdo de la aparteneco al la Akademio rezultigas la maleblon ricevi sumojn pagitajn kiel kotizojn aŭ kontribuojn.

## *Kapitalo kaj administra jaro*

Art. 25

La socia kapitalo konsistas el:
- (a) moveblaĵoj de la Akademio;
- (b) jaraj membrokotizoj, fiksataj ĉiujare de la Akademia Senato;
- (c) kontribuoj de la subtenaj membroj, de organizaĵoj aŭ privatuloj, kiuj intencas helpi la evoluon de la Akademio;
- (ĉ) rezerva fonduso por neantaŭvideblaĵoj;
- (d) ĉia alia rezulto de Akademia agado.

Art. 26

La financa jaro finiĝas la 31-an de decembro.
Fine de ĉiu financa jaro, la Akademia Senato preparas la buĝeton kaj finkalkulon de la Akademio.

## *Dissolvo*

Art. 27

Pri la dissolvo de la Akademio oni decidu nur per absoluta plimulto de la aliĝintoj. Samtempe kun la dissolvo, la Asembleo nomumas unu aŭ plurajn likvidontojn. La aktiva kapitalo estos transskribita al organizaĵoj kun humanecaj aŭ kulturaj celoj.

## *APENDICO AL LA STATUTO:*

Transiraj kaj pliprecizigaj reguloj kaj klarigoj

*1. Valideco kaj ŝanĝebleco de pliprecizigoj kaj decidoj akordigeblaj kun ĉi tiu statuto.*

1.1 Tiu ĉi statuto estas mallongigo de la fondostatuto de 1985-09-13/1685pfR kaj enhavas precize tiujn partojn, kiuj necesis kaj sufiĉis por la laŭjura aprobo fare de la Konsilio de la XII de la Respubliko de San-Marino, okazinta 1986-11-25/1686pfR. Forigitaj partoj ne plu validas, se ili ne estas konservataj en ĉi tiu apendico aŭ transprenitaj en la regularojn pri alvoko, kunsidoj, administrado, honorigoj, instruado kaj ekzamenado.

1.2 Pluvalidas (kie ne postaj decidoj, la starigotaj regularoj kaj ĉi tiu apendico ilin ŝanĝas) la dekretoj 1 (baza regularo) kaj 2 (aparteneco) de la fondoprezidanto same kiel la post 1985-09-13/1685pfR jam protokolitaj decidoj de la Ĝenerala Asembleo (de la Scienca Sektoro - artikolo 8), de la Asembleo de la Subtena Sektoro (artikolo 15) kaj de la Senato (art. 10).

1.3 Eventualaj estontaj ŝanĝoj de la regularoj bezonas la apogon de la Senato inkluzive la voĉon de la Prezidanto aŭ de la Vicprezidanto kaj de almenaŭ du trionoj en la koncernata Asembleo.

1.4 Eventualaj estontaj ŝanĝoj de ĉi tiu Apendico bezonas la apogon de la Senato inkluzive la voĉojn de la Prezidanto kaj de la Vicprezidanto, kaj la aprobon fare de almenaŭ tri kvaronoj en la Asembleoj de la Subtena kaj de la Scienca Sektoroj.

1.5 Eventuala ŝanĝo de la statuto mem bezonas la saman apogon kiel la ŝanĝo de la Apendico, kaj krome la aprobon de la Konsilio de la XII.

1.6 La sekvantaj partoj de ĉi tiu Apendico pliprecizigas kaj klarigas precipe la samnumerajn artikolojn de la Statuto.

*2. Lokoj, manieroj kaj celoj de la laboro.*

2.1 La Akademio celas kontraktadi kun la kompetentaj ŝtataj instancoj de la Respubliko de San-Marino (precipe laŭ art. 17 de la Kadroleĝo pri la universitata instruado kaj institucioj de altgrada klerigo de 1985-10-31/1685pfR) kaj konformigas internaciajn kursojn kaj universitatnivelajn prelegseriojn al la leĝaj kondiĉoj, tiel ebligante al taŭgaj studintoj la akiron de sciencistaj (akademiaj) gradoj kaj titoloj.

2.2 Krom en la Respubliko de San-Marino mem kaj kadre de la ĉiterenaj leĝoj la Akademio povas realigi kursojn kaj konferencojn ankaŭ eksterlande. Tiucele ĝi povas kunlabori kun universitatoj, esplorcentroj kaj aliaj institucioj de supera instruado kie ajn ili troviĝas, se ili respektas la principon de la sennacieco de sciencoj kaj celas internacian sciencan kunlaboradon.

2.3 Krom la formoj de la tradicia universitatnivela instruado la Akademio povas apliki ankaŭ novajn klerigteknologiajn (precipe telekomunikajn, aŭdvidajn kaj perkomputilajn) rimedojn.

2.4 La Akademio priokupiĝas ankaŭ pri la difino kaj aplikado de internaciaj normoj por la kompara prijuĝo de sciencistaj gradoj kaj titoloj en akordo kun la ĝeneralaj nivelpostuloj de la ĉapitro IV (artikoloj 18-20) de la Kadroleĝo pri la universitata instruado kaj institucioj de altgrada klerigo.

*3. Apartenec-kategoroj*

3.1 Ekzistas kvin kategorioj de aparteneco al AIS: la aparteneco kiel plenrajta membro (MdAIS). asociita membro (AMdAIS), honora membro (HMdAIS), subtena membro (SMdAIS),





aŭ adjunkto de AIS (AdAIS). Nur plenrajta aŭ asociita membro estas „efektiva" membro en la senco de la Statuto. „Akademiano" estas efektiva membro, adjunkto, aŭ honora membro de la scienca sektoro. „Membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj" en la strikta senco esprimata per la mallongigo „MdAIS" estas plenrajta membro.

3.2 Membro de la Subtena Sektoro (SubS) povas samtempe aparteni al la Scienca Sektoro (SciS) kiel efektiva (plenrajta aŭ asociita) membro aŭ kiel adjunkto, tie havante la samajn rajtojn kiel la aliaj samkategoriaj apartenantoj de la Scienca Sektoro.

3.3 La aparteneco al la Scienca aŭ al la Subtena Sektoro ankaŭ ne ekskludas la samtempan apartenecon al eventuale starigota Sektoro Arta aŭ Teknika.

3.4 La alinejoj 3.2 kaj 3.3 validas ankaŭ por honoraj senatanoj, por la honoraj civitanoj de la sekcioj aŭ departementoj, kaj por la honoraj civitanoj de la subtena sektoro.

3.5 Sciencaj asocioj, universitatoj, entreprenoj kaj aliaj organizoj, kiuj finance aŭ agade subtenis jam antaŭe la Akademion, povas fariĝi kolektivaj subtenaj membroj laŭ la regularo de alvokoj kaj aligoj.

*4. Internacia Lingvo*

4.1 Kiel „la Internacian Lingvon" (mallongigo: ILo) la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) agnoskas la lingvon, kiun iniciatis L.Zamenhof en 1887 kaj kiu baziĝas laŭ la deklaracio de Boulogne-sur-Mer (1905) sur la t.n. „Fundamento". Tiu ĉi difinas per la „Kvinlingva Gramatiko" kaj la „Universala Vortaro" la lingvan kodon. Plievoluo de la lingvo devas esti logike konforma al la tiel difinita kodo kaj neniukaze ĝin anstataŭas.

4.2 La Internacia Lingvo estas la sola laborlingvo de la Senato kaj de la Ĝenerala Asembleo (de la SciS). Kiam en la Asembleo de la SubS okazas tradukoj, tiam ILo estas la sola cellingvo.

4.3 Kie laŭ la regularoj pluraj oficialaj lingvoj de la Akademio estas uzataj ILo estas unu el ili.

*5. Tradukoj*

5.1 La Statuto estu publikigata ĉiam kune kun (kaj samlingve kiel) ĉi tiu Apendico.

5.2 La oficialigitaj, diverslingvaj tradukoj de la Statuto kaj la Apendico estas ĉiuj samvalidaj. En kazo de dubo oni orientiĝu laŭ la teksto en ILo kaj laŭbezone laŭ la protokolita (aŭ eventuale alimaniere dokumentita) tradicio.

*6. Rango-titoloj*

6.1 Honora membro de AIS (HMdAIS) povas esti elektita (a) de la subtena sektoro kun aprobo de la Senato (tial ricevinte la honoran rangotitolon „honora civitano de la subtena sektoro de AIS") aŭ (b) de la Ĝenerala Asembleo de la scienca sektoro - aŭ de sekcio de ĝi - kun la aprobo de la Senato (tial ricevinte la honoran rangotitolon „honora civitano de - la ...a sekcio de - AIS") aŭ (c) de la Senato, kiu per tio havigas la rangotitolon „honora senatano de AIS".

6.2 Same kiel la honoraj membroj, ankaŭ la adjunktoj (AdAIS) kun la rangotitoloj „adjunkto scienca de AIS" (ASci.) aŭ „asociita docento de AIS" (ADoc.) apartenas al la scienca sektoro sen voĉdonrajto en la Ĝenerala Asembleo.

6.3 Nur la efektivaj membroj - nome la asociitaj membroj (AMdAIS) kun la rango-titolo „plenrajta docento" (PDoc.) aŭ „asociita profesoro" (AProf.), kaj la plenrajtaj membroj (MdAIS) kun la rangotitolo „orda profesoro" (OProf.) havas voĉdonrajton en la Ĝenerala Asembleo de la scienca sektoro. La plenrajtaj membroj estas krome elekteblaj en la Senaton.

*7. Strukturo de la scienca sektoro*

7.1 La scienca sektoro konsistas el la jenaj ses sekcioj:
Sekcio K (sekcio 1): Kibernetiko
Sekcio H (sekcio 2): Humanistiko
Sekcio S (sekcio 3): Struktursciencoj
Sekcio F (sekcio 4): Filozofio
Sekcio N (sekcio 5): Natursciencoj
Sekcio M (sekcio 6): Morfosciencoj
La sekciestro havas la roltitolon „dekano".

7.2 Ĉiu sekcio de la scienca sektoro povas konsisti el subsekcioj („fakaroj" aŭ „departementoj").

7.3 La Senato kaj la Ĝenerala Asembleo povas delegi, laŭ la regularo pri kunsidoj, decidojn al organoj de sekcioj de la scienca sektoro.

7.4 La organoj de AIS kaj de ties sektoroj kaj sekcioj povas krei por specialaj taskoj komisionojn.

*8. Ĝenerala Asembleo*

8.1 Publika invito povas okazi per „oficiala sciigo de AIS" en (minimume kvaronjara) revuo, kun kiu estas farita, kun aprobo de la Ĝenerala Asembleo, interkonsento pri regula publikigo de tiaj sciigoj, kaj kiun la subtena sektoro distribuadas.

8.2 Se la dato kaj tagordaj punktoj de kunsido de la Ĝenerala Asembleo jam sekvas el la re-

gularo pri kunsidoj, tio validas kiel statutkonforma alvoko.

8.3 La adjunktaj apartenantoj de la scienca sektoro, la honoraj membroj de AIS kaj la subtenaj membroj havas ĉeestrajton.

8.4 La kunsidregularo limigas la parolrajton.

8.5 La kunvoko de la Ĝenerala Asembleo fare de la Vicprezidanto okazas ĉu en sciigenda interkonsento kun la Prezidanto, ĉu en situacio (same sciigenda), en kiu la Prezidanto demisiis, aŭ estasmalhelpata mem inviti.

*9. Kvorumeco de la Ĝenerala Asembleo*

9.1 „Ĉeestanta" en la senco de artikolo 9 estas efektiva membro en la ĜA, se li/ŝi aŭ persone ĉeestas aŭ estas skribe deleginta sian voĉdonrajton al persone ĉeestanta alia efektiva membro.

9.2 La klaŭzo „la duono plus 1" en la Itala teksto signifas „la duono plus 0,5", kaze ke la nombro de la efektivaj membroj ne estas para.

9.3 Membroj kiuj ankoraŭ ŝuldas sian membrokotizon por la aktuala jaro ne havas voĉdonrajton sed ja ĉeestrajton; ili nek estu atentataj en la suma listo de la aktualaj membroj, nek alkalkulataj al la nombro de la ĉeestantoj.

*10. Elekto de la Senato kaj de la Prezidanto*

10.1 La esprimo „universitataj profesoroj havantaj katedron" en la Itallingva teksto de artikolo 10 estas traduko de la esprimo „orda profesoro" el la internacilingva teksto, t.e. profesoro kun plej alta, daŭra rango, do egalranga al la profesoroj, al kiuj en kelkaj landoj tieaj universitatoj atribuas katedron.

10.2 Orda profesoro en la senco de artikolo 10 nur povas esti efektiva membro de AIS, al kiu estas laŭ la alvokoregularo agnoskita la rango-titolo „orda profesoro" (OProf.) de AIS kaj la aparteneckategorio „plenrajta membro de AIS" (MdAIS). Ĉi tiu agnosko nur eblas, se la efektiva membro aŭ jam havas aŭ havis la saman rangon en universitatnivela kleriginstitucio eksterlanda, aŭ montris per sia scienca laboro la samrangan nivelon.

10.3 Por ĉiu membro de la Senato estu elektata orda profesoro de AIS kiel anstataŭanto por la kazo de morto, de alia ĉeestmalhelpo, aŭ de demisio.

10.4 La Ĝenerala Asembleo rajtas proponi al la Senato unu senatanon por la elekto kiel Prezidanto. Tiukaze la Senato nur per 2/3 de siaj voĉoj povas elekti alian senatanon kiel Prezidanton.

10.5 La elektita Prezidanto rajtas proponi al la Senato unu senatanon por la elekto kiel Vicprezidanto. Tiukaze la Senato nur per 2/3 de siaj voĉoj povas elekti alian senatanon kiel Vicprezidanton.

*11. Efektivigo de la senata laboro*

La regularoj (pri alvoko, kunsidoj, administrado, honorigoj, instruado, ekzamenado, kaj eventuale en la estonteco pluaj) deciditaj jam de la Senato sed ankoraŭ ne aprobitaj aŭ malaprobitaj de la Ĝenerala Asembleo validas provizore ĝis kiam ili estas aŭ anstataŭataj per alia regularo fare de la Senato aŭ aprobitaj aŭ malaprobitaj fare de la Ĝenerala Asembleo.

*12. Kvorumeco de la Senato.*

12.1. Ĉeestanta en la senco de artikolo 12 estas senatano se li/ŝi aŭ persone ĉeestas aŭ estas skribe deleginta sian voĉdonrajton al persone ĉeestanta alia senatano. Al la neĉeestintaj senatanoj la decidoj estas senprokraste sciigendaj. Se ne dum 4 semajnoj post ĉi tiu sciigo pli ol la duono de la senatanoj skribe aŭ telegrame kontraŭas, tiam la decido ekvalidas.

12.2 La klarigo 9.2 validas ankaŭ por la artikolo 12.

*13. Kazoj de urĝeco*

13.1 En urĝaj kazoj decidas la Prezidanto interkonsiliĝinte kun la Vicprezidanto kaj laŭbezone kun la Senata Sekretario aŭ la Trezoristo.

13.2 Se la Prezidanto antaŭvidas, ke pluraj decidoj estonte urĝos pri similaj problemoj, li decidu surbaze de regulo starigenda de li kaj diskonigenda kiel dekreto. Dekreto validas ĝis kiam la decidrajta instanco ĝin ŝanĝas.

13.3 En la kazo de agadmalhelpateco de la Prezidanto la Vicprezidanto plenumas ĉiujn taskojn ne facile prokrasteblajn, kaj havas ĉiujn rajtojn de la Prezidanto.

*14. Buĝeta jaro de la Scienca Sektoro*

La buĝeto proponenda de la Trezoristo al la Senato kaj la bilanco prezentota al la Ĝenerala Asembleo koncernas la tempointervalon de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro.

*15. Organoj de la Subtena Sektoro*

15.1 Por ĉiu membro de la 5-7-persona estraro (= Direkta Konsilio) de la Subtena Sektoro





estu elektata anstataŭanto por la kazo de morto, de alia ĉeestmalhelpo aŭ de demisio.

15.2 La Asembleo de la subtenaj membroj povas krome elekti por la estraro kromajn membrojn kun funkcioj konsilaj kaj plenumaj. Ili formas kune kun la estraranoj kaj iliaj anstataŭantoj la „Komitaton de la Subtena Sektoro".

15.3 La Direktoro estas elektenda el la estraro, la Vicdirektoro el la estraro aŭ el inter la aliaj komitatanoj, la sekretario estas elektebla ankaŭ el inter la subtenaj membroj ne apartenantaj al la Komitato.

15.4 La Asembleo rajtas proponi al la estraro unu estraranon por la elekto kiel direktoro. Tiukaze la estraro nur per 2/3 de siaj voĉoj povas elekti alian estraranon kiel direktoron.

15.5 La elektita Direktoro rajtas proponi al la estraro unu membron de la Komitato por la elekto kiel Vicdirektoro. Tiukaze la estraro nur per 2/3 de siaj voĉoj povas elekti alian komitatanon kiel vicdirektoron.

15.6 Se foresta subtena membro estas elektita de la Asembleo aŭ de la estraro kaj ne estas skribe akceptinta la elekton dum la sekvinta kalendara monato aŭ antaŭ la komenco de la unua kunsido de la elektinta organo de la subtena sektoro, tiam okazu nova elekto; kaze de malakcepto de elekto la nova elekto okazu je la plej frua okazo. La deĵortempo de tiel postelektito finas kune kun la deĵortempo de la aliaj elektitoj.

15.7 La regulo 13.3 validu analoge por la Direktoro kaj Vicdirektoro.

*16. Funkciado de la Asembleo de la SubS*

16.1 La klarigoj 8.2, 9.1, 9.2 kaj 9.3 validas ankaŭ por la artikolo 16 de la Statuto.

16.2 Voĉo estas delegebla nur al subtena membro.

16.3 Subtena membro, kiu en la antaŭa buĝeta jaro de la subtena sektoro krompagis donace minimume duoblan jarkotizon, ricevas laŭ la preskriboj de la kunsidregularo por ĉiu voĉdonado kaj elekto okazanta en la Asembleo krom la voĉo pro membreco (membrovoĉo) kroman „donacdependan" voĉon; donacinte minimume 4 jarkotizojn li ricevas 2 donacdependajn voĉojn, donacinte minimume 8 jarkotizojn li ricevas 3 donacdependajn voĉojn ktp.

16.4 Kolektivaj membroj estas reprezentataj en la Asembleo per 1-3 legitimigitaj reprezentantoj, el inter kiuj unu uzas la membrovoĉon de la kolektiva membro. Se tia kolektiva membro donacis en la antaŭa buĝeta jaro al AIS kaj estas reprezentata per 2 aŭ 3 legitimigitaj reprezentantoj, ĉiu ricevas tiom da donacdependaj voĉoj, kiom kalkuliĝas laŭ 13.3 el la duono aŭ triono de la donacita sumo.

16.5 Kaze ke en la Asembleo ne ĉeestas (t.e. nek ĉeestas persone, nek estas reprezentataj) la kvanto da membroj preskribita en artikolo 16, eblas decidi provizore, se la Direktoro aŭ la Vicdirektoro persone ĉeestas. Provizoraj decidoj estos nuligataj, se ili ne ricevas dum la sekvanta kalendara monato la aprobon fare de la absoluta plimulto de ĉiuj eblaj voĉoj per skriba konsento de sufiĉa nombro de membroj, kiuj ne ĉeestis.

*17. Buĝeto de la Subtena Sektoro*

Almenaŭ 30% de la membrokotizoj de la subtena sektoro kaj almenaŭ 5% de ĉiu mondonaco ricevita de ĝi estu disponigataj al la scienca sektoro; eventuala indiko de celita uzado estas rekomendo, ne kondiĉo, krom en la kazo, ke la donacinto mem ligis la donacon al celoj pri kiuj kompetentas la scienca sektoro.

*18. Buĝeta jaro de la Subtena Sektoro*

La buĝeta jaro de la Subtena Sektoro komenciĝas la 3an de septembro kaj finiĝas la 2an de septembro, do ne koincidas kun al buĝeta jaro difinita en artikolo 26 kaj la apendica punkto 14 por la scienca sektoro.

*19. Revizoraro*

19.1 La revizoraro kontrolas ankaŭ la Subtenan Sektoron.

19.2 La estraro de la subtena sektoro havas la rajton proponi al la Ĝenerala Asembleo (de la scienca sektoro) tri revizorojn. En tiu kazo almenaŭ unu el tiu ĉi listo estu elektenda en la revizoraron.

19.3 Almenaŭ unu el la Revizoroj havu bonajn konojn de la Itala lingvo kaj estu prefere ŝtatano de San-Marino.

19.4 Estas elektebla Revizoro ĉiu persono minimume 25 jarojn aĝa, kiu apartenas al AIS laŭ unu el la kvin aparteneckategoroj (MdAIS, AMdAIS, HMdAIS, SMdAIS, AdAIS).

*20. Aliĝoj*

20.1 La estraro de la Subtena Sektoro rajtas akcepti sen antaŭa unuopa aprobo de la Senato ĉiun membron de la Internacia Scienca Kolegaro (ISK) de AIS. Al ISK apartenas ĉiuj efektivaj membroj, ĉiuj adjunktaj apartenantoj de la scienca sektoro, kaj plue aliaj sciencistoj laŭ kriterioj difinitaj de la Senato.

20.2 La Senato rajtas akcepti novan subtenan membron ekster ISK nur kun antaŭa apro-

bo flanke de la direktoro aŭ de la estraro de la Subtena Sektoro.

*21. Kotizoj*

21.1 La kotizo pagenda de apartenantoj de la scienca sektoro ne superu 15‰ de la kotizo pagenda de subtena membro. La alteco povas dependi de la aparteneckategorio. Ĝi estu simbola kotizo.

21.2 La aparteneco de efektivaj kaj de subtenaj membroj same kiel de adjunktoj aŭtomate estas suspendita ekde la komenco de la nova buĝeta jaro ĝis kiam la koncerna kotizo estos pagita. Se la aparteneco jam estas suspendita dum du jaroj, la Senato decidu pri eventuala forpelo, konsiderante la ĝisnunan kunlaboremon de la koncernato. Por subtenaj membroj estu ankaŭ konsiderata la opinio de la estraro de la Subtena Sektoro.

21.3 Honoraj membroj ne pagas kotizon.

21.4 Se la koncernata sekcio, la Senato kaj la Ĝenerala Asembleo devas konstati, ke profesoro aŭ docento akiris sian rangotitolon ĉe AIS per trompo, ĉi tiu titolo estu malagnoskata.

Alikaze, kaj se ne okazas rangoplialtigo,

(a) profesoro de AIS konservas sian rangotitolon (OProf. aŭ AProf.) dumvive, eĉ perdinte sian apartenecon (kiel MdAIS aŭ AMdAIS) pro nepago de la kotizo aŭ (kaze de asociita profesoro) pro neplenumo de siaj devoj laŭ la alvokoregularo.

(b) docento de AIS konservos sian rangotitolon (PDoc. aŭ ADoc.) dumvive - se ĝi ne estas atribuita al li/ŝi nur por limigita tempointervalo - , eĉ perdinte sian apartenecon (kiel AMdAIS aŭ AdAIS) pro nepago de la kotizo aŭ pro neplenumo de siaj devoj laŭ la alvokoregularo.

*La Statuto kune kun la Apendico estas aprobita de la Senato: 1987-04-02/1686pfR, ratifikita de la Ĝenerala Asembleo 1987-04-04/1686pfR, kaj la saman tagon ankaŭ agnoskita de la estraro de la Subtena Sektoro.*

*La Prezidanto:* *La direktoro de la Subtena Sektoro:*

*OProf.Dr.habil.H.Frank ADoc.Dr.L.Weeser-Krell*

*La laŭleĝa oficialigo okazis 1987-05-02/1686pfR*

---

## *Protokolo de la 6-a Kunsido de la Senato*

*okazinta de mardo, 1987-03-31/1686pfR, 15:30 h, ĝis vendredo, 1987-04-03, 18:05 h, en la hotelo Rossi, Domagnano (RSM)*

1. *(Formalaĵoj)* OProf.Dr.Frank kiel prezidanto malfermas kaj konstatas la ĉeeston ankaŭ de la MdAIS vicprezidanto OProf.Pennacchietti, de la Senata Sekretario OProf.Pancer, kaj de dekano OProf.Popovic. Krome ĉeestas F-ino I.U.Frank kiel estraranino de la SubS anstataŭante ties direktoron. Protokolas la Senata Sekretario kunlabore kun la Prezidanto. Gvidu la kunsidon la Prezidanto. - La tagordo sekvota estas unuanime akceptita. - OProf.Mužic delegis sian voĉon al OProf.Pancer. Kun entute 5 de momente 7 voĉoj la kunsido estas kvoruma.

2. *(Programo de SUS 4 : 1987-08-29/09-07)*

Okazos envestigoj kaj novaj alvokoj. Laŭ propono de sekcio 3 kolego Celakovski estu alvokata kiel AProf. por la fako matematiko (3.3). Diskutante la demandon levitan dekomence de sekcio 1 pri la alvokeblo de kolego Casali evidentiĝas, ke laŭ la ĝisnuna alvokomaniero sciencistoj el SanMarino preskaŭ ne povus fariĝi profesoroj aŭ docentoj de AIS. Tamen artikolo 7 de la fondostatuto (art. 6 de la estonta statuto) ebligas disan pritrakton de sanmarinaj civitanoj.

Interesitoj pri oficiala invito povas ricevi de la Senata Sekretariejo aserton pri akceptita prelego kaj laŭbezone la formalan invitleteron kun stampo, se ili ne malaprobas la formalan konfirmon pri la transprenebleco de la restadkostoj. La buĝeto ne antaŭvidas kaj ne povas en la proksima estonteco antaŭvidi vojaĝ- aŭ studadstipendiojn. Interesitaj esperantistoj turniĝu al la koncerna fonduso starigita de UEA.

La Senato kun ĝojo aprobas laŭ rekomendo de kolego Mužic la sinoferton de S-ino Ŝiukanec kontribui kun infangrupo al la arta kadra programo. La SubS prezentu la peton al la Dikastero.

Por ĉiuj 6 sekcioj estas ofertitaj kursoj, prelegserioj kaj prelegoj. Lingvokursojn „ILo por Sciencistoj" realigu sabaton/dimanĉon ASci. C.Dazzini, lundon - vendredon ASci. E.Formaggio (komencantoj) kaj ADoc. R.Schulz (progresintoj). OProf.Pancer daŭrigu sian oficon kiel direktoro de la ekzamenoficejo. SUS 4 okazu en SanMarino, laŭeble grandparte en la liceo.

*(Interrompo 18:00 h. Remalfermo merkredon, la 1-an de aprilo, 8:50 h)*

3. *(Aktualigo de la Statuto)* 1986-11-25 la Konsilio de la XII aprobis la Fondostatuton de 1985-09-13 en mallongigita formo. La Senato devas ĝin pliprecizigi kaj klarigi per apendico. Oni agnoskas post diskuto kaj ŝanĝetoj surbaze de





apendicpropono de la prezidanto la artikolojn 1 kaj 2 kun koncernaj apendiceroj.

*(Interrompo 9:30 - 16:45 h por partopreno en la ceremonio de la ŝanĝo de la ŝtatestroj.)*

La Artikoloj 3 - 10 de la Statuto kune kun la koncernaj apendiceroj estas aprobataj post pridiskuto kaj interkonsentitaj ŝanĝetoj.

*(19:10 h ĝis ĵaŭdo, 9:15 h interrompo por ebligi interkonsiliĝon kun la Ministrino.)*

Post raporto de la Prezidanto pri la progresoj rilate la problemojn de ejo por AIS kaj de la agnosko de la AIS-laboro laŭ la okazinta interparolado kun la Ministrino la statutartikoloj 11 - 18 kun la koncernaj apendiceroj estas akceptataj.

Tuj aplikante la art. 15 kun koncernaj apendiceroj oni diskutas la situacion de la SubS kaj unuanime starigas la jenan rezolucion:

*La Senato, pliprecizigante sian koncernan decidon el sia 5-a kunsido, malkvietiĝinte pro la neklara stato de la estrara kaj komitata laboro en la SubS, kaj dezirante, ke nepre bonorde kaj bontempe ekfunkciu ĉi tiu laboro nemalhavebla por la realigo de SUS 4 en SanMarino, konstatas kaj decidas:*

*(1) 1986-08-12/85pfR deputato F.Morganti donis kiel ministrino respondeca pri AIS al gimnazia profesorino Marina Michelotti taskojn rilate la flegadon de la kontaktoj de la Dicastero P.I. e Cultura al AIS, ŝin farante per tio oficiala kunordigantino de la aktivecoj de la Dikastero kun la aktivecoj de la Subtena Sektoro. Krome kaj sendepende de tio Fausta Morganti apartenas al la Senato kiel honora senatanino, kaj Marina Michelotti al la Komitato de la SubS kiel ties unua honora civitanino. Konforme al art. 6 de la Statuto tiu stato de honora membreco ne rajtigas paroli aŭ decidi en la nomo de la Senato aŭ de la Subtena Sektoro, krom en kazoj, en kiuj por limigita tempo specialaj taskoj estas konfiditaj de la decidrajtaj instancoj de AIS.*

*(2) Oni konstatas ke de la estraro de la SubS eklaboris ges-oj ADoc.Dr.Weeser-Krell (direktoro), ADoc. Dr.Klemm, kaj Ines Ute Frank, ke bedaŭrinde demisiis la elektita vicdirektoro Grego, kaj ke ankoraŭ ne skribe akceptis la elektitecon la s-oj Colombini kaj Rossi dott. . La Senato konfidas, ĝis kompletiga elekto de la estraro fare de kvoruma Asembleo de la SubS, komisiitan estraranecon al Ĝenerala Konsulo C.H.von Herden, petas kolegon Grego resti almenaŭ en la komitato kaj esti je dispono kiel komisiita anstataŭanta estrarano, kaj nomumas - same ĝis eventuala alia elekto - ankaŭ la jenajn gesinjorojn komisiitaj anstataŭantaj estraranoj, kondiĉe ke ilia membreco al la SubS momente validas kaj ke ili akceptas la taskon: Fantini, Miriam Michelotti, Raffo, Sammaritani. Se de la elektitaj estraranoj Colombini kaj Rossi ne estos alveninta ĝis la 15a de majo skriba akcepto de la elektiteco, ili ne estu konsiderataj valide elektitaj.*

*(3) La estraro elektu sian vicdirektoron el inter la estraranoj aŭ aliaj Komitatanoj, kaj Sekretarion el inter la Komitatanoj aŭ la aliaj subtenaj membroj. -*

*(Interrompo de la kunsido por rigardo de ebla sidejo kaj por tagmanĝo: 12:00 - 15:50 h.)*

La restaj statutartikoloj kun koncernaj apendiceroj estas post diskuto kaj ŝanĝoj aprobataj.

Tuj aplikante la art. 21 kun koncerna apendiceroj oni decidas ekde 1988 (jaro tiurilate jam komenconta per la majo 1987) postuli simbolan jaran kotizon de ĉiuj membroj de la Internacia Sciencista Kolegaro (ISK) de AIS. La simbola kotizo estu 2 internaciaj respondkuponoj (IRK) de ISKanoj kiuj ankoraŭ ne ricevis alvokon, 3 IRK de ĉiu AdAIS, 4 IRK de ĉiu AMdAIS kaj 5 IRK de ĉiu MdAIS. 50 IRK estu egalvaloraj al 1 AKU (= „Akademia Kotiz-Unuo", t.e. jarkotizo de la SubS, momente 100,- aŭ 70.000 LIT) t.e. 1 IRK = 0,02 AKU. Kaze de samtempa membreco en la SubS tiu simbola kotizo estas inkluzivita en la jarkotizo (1 AKU).

4. *(Starigo kaj aktualigo de la regularoj)*

Por respekti la fakton, ke ILo jam ekzistas 100 jarojn kaj ke ĝia enkonduko en la sciencojn eĉ ekster la Esperanto-movado jam komencis antaŭ pli ol 10 jaroj, oni decidas aboli la uzadon de la kvar etnaj lingvoj oficialaj ĉe AIS kiel eblaj laborlingvoj de la ĜA. Tial oni post SUS 4 ne plu akceptu novajn efektivajn membrojn eĉ nur asociitajn sen kontentiga komprenkapablo kaj sufiĉa esprimkapablo en ILo.

Estu konforme al art. 6 de la Statuto alvokataj al AIS sciencistoj el SanMarino laŭ proponoj farotaj de la jenaj sanmarinaj civitanoj: Bigi avv. prof., Casali prof., Gatti dott., Ghironzi dott., Guardigli avv., Maiani dott., Morganti dott., Nicolini avv. . Neformalaj proponoj ankaŭ flanke de aliaj civitanoj de RSM, se ili apartenas al la Subtena Sektoro, estas bonvenaj.

La Prezidanto en interkonsento kun la Vicprezidanto prezentu alvokoregularon, kiu respektas la ĝisnunajn decidojn kaj spertojn.

La Senato petas la senatanojn Pancer kaj Popovic aldoni eventualajn erojn al la ekzamenregularo pritraktita jam de senatano Neergaard kaj sendi la rezulton al la Prezidanto ĝis la 1-a

de junio por ke la Prezidanto prezentu la tekston decidpreta al la Senato.

La Prezidanto kiel deĵoranta trezoristo prezentu decidpretan regularon pri mastrumado ĝis SUS 4. Por plifaciligi la pagadon precipe inter AIS kaj siaj apartenantoj intertempe jam estas ofertate al efektivaj kaj al aubtenaj membroj, same kiel al adjunktoj kaj aliaj ISKanoj, havi personan subkonton privatan ĉe AIS en AKU. Tia konto ne havigu interezojn. Kaze de subtena membro ĝi estu likvigota se ĝia enhavo malsuperas 1 AKU, kaze de ISKanoj kiam ĝi malsuperas 0,1 AKU = 5 IRK. La mono sur la persona subkontoj privataj ne estu konsiderata en la buĝeto kaj financraporto de AIS ties havaĵo. Kontraŭe por senatanoj, dekanoj, departamentestroj, kaj estraranoj de la SubS (inkluzive la anstataŭantojn) eblas starigi (kroman) personan subkonton deĵoran, utiligeblan por kovri la personajn, porAISajn elspezojn; la enhavo de ĉiu tia subkonto estas celoligita havaĵo de AIS.

*(Interrompo 19:00 h. Rekomenco: vendredon, 1987-04-03, 8:35 h)*

...

La Senato konstatas, ke estas tute normale kaj dezirinde, ke laŭeble multaj ordaj universitataj profesoroj fariĝu adjunktoj sciencaj de AIS se ili plenumas la necesajn kondiĉojn por tia alvoko. Kondiĉo por aparteni samrange al AIS kiel al sia nacia universitato estas la konformeco al la karakterizaj trajtoj de AIS. Nur en raraj esceptoj precizigendaj en la alvokoregularo eblas akiri ĉe AIS pli altan rangon ol tiu akirita jam nacinivele.

Post diskuto kaj decido pri ŝanĝoj la Senato akceptas la regularon pri instruado proponitan de la Prezidanto; por la artikolo6.7 necesas nova vortigo; la artikoloj ekde 7 estas kompletigendaj kaj ankoraŭ decidendaj.

*(Paŭzo de 12:45 h ĝis 16:10 h)*

5. *(Plifirmigo de la pozicio de AIS)*

La Prezidanto informas pri la intertempe ricevitaj konfirmoj fare de advokato Busignani, ke AIS estas akceptita kiel instituciо sen profitdona celo (do komunutila), ke ne estas obstaklo aldoni la deciditan apendicon al la Statuto, se ili ne konfliktas, kaj ke la aprobo ankaŭ fare de la morgaŭa ĜA sufiĉos por la definitiva oficialigo, se ne okazos pravigebla dubo pri la kvorumeco.

La Senato aprobas la klopodon interkonsenti pri reciproka subteno kaj agnosko kun gravaj organizoj uzantaj ILon. La interkonsentoj kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj kun la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) estu proponotaj morgaŭ al la ĜA por ratifiko.

La Senato aprobas la klopodojn starigi interkonsentojn kun universitatoj aŭ universitatnivelaj institucioj kaj daŭrigi la agadojn ĉe registaroj kaj parlamentoj.

Nemalhavebla estas konkreta sidejo kun telefono en RSM.

6. *(Publikigado)* La Internacia Sciencista Dokumentaro estas en la stato de enkomputiliĝo.

7. *(Informbroŝuro de la SubS)* De pluraj efektivaj membroj ankoraŭ mankas la petitaj fotoj. El SanMarino kelkaj kromaj fotoj estas ofertitaj de Marina Michelotti.

8. *(Diversaĵoj)* Por reliefigi la plivalorigon de la rango de adjunktaj apartenantoj kiuj ne havas la devojn kaj rajtojn de adjunkto-docentoj, oni enkondukas ekde tuj la rangotitolon „Adjunkto Scienca" (ASci.). - La simbolo (emblemo) loke proponita ne taŭgas por ĉiuj celoj. La Senato proponu morgaŭ al la ĜA tamen toleri la uzadon kie ĝi jam surloke okazas, sed daŭrigi la serĉadon de malkomplika simbolo senprobleme uzebla ankaŭ por la leterpapero de AIS; oni volonte akceptas la promeson telefone donitan de senatano Neergaard sendi pensigajn ekzemplojn.

| | |
|---|---|
| OProf.Pancer dr. | OProf.Dr.Frank |
| Senata Sekretario | Prezidanto |

---

## Protokolo de la 3a Ĝenerala Asembleo

*okazinta sabaton, 1987-04-04, 10:00 - 12:00 h, en la Liceo de SanMarino Citta'*

1. *(Formalaĵoj)* OProf.Frank kiel prezidanto malfermas kaj konstatas la ĉeeston ankaŭ de la MdAIS Pancer, Pennacchietti, Popovic, de la AdAIS Colombin, Pagliarani, Tyblewsky, de la estraranoj kaj aliaj membroj de la SubS Fantini, I.U. Frank, Marina kaj Miriam Michelotti, P.Raffo kaj G.Sammaritani, kaj de S-ino Marin kiel gasto. Delegis siajn voĉdonrajtojn la gekolegoj Adcock, Brockmeyer, DeJaeger, Jordan, Makabe, Meszaros kaj WeeserKrell. Neniu kontestas la kvorumecon. La nura laborlingvo de la kunsido estu ILo. Protokolu I.U.Frank. Gvidu la asembleon la Prezidanto. La tagordo sekvota





estas unuanime akceptita. Unuanime oni permesas la ĉeeston de la gasto ankaŭ dum la sekvantaj tagordaj punktoj.

2. *(Programo de SUS 4)* Oni aŭdas kontente la ĝisnunan programpreparon kaj speciale aprobas la rekomendon al la SubS kaj al la Dikastero ebligi la kontribuojn de la baleta grupo Ŝcukanec (Zagreb) kaj de la kantistino Angelova (Sofio) al la kadra programo. Por certigi la ankaŭ lingvan nivelon de la scienca kursprogramo oni decidas unuanime:

*Estontaj alvokoj en la sciencan sektoron de AIS okazu kun konsidero de la ILo-konoj, tiel, ke de la profesoroj kaj docentoj estu postulata sufiĉa skriba kaj buŝa esprimkapablo en la Internacia Lingvo. Nur kaze de Adjunkto Scienca, kiu estas elstara esploristo aŭ universitata profesoro eksterlanda, eventuale sufiĉas la nura legkapablo.*

3. *(Aktualigo de la Statuto)* La Prezidanto prezentas la mallongigitan statuton kaj la apendicon aprobitajn de la Senato. La ĜA ratifikas ambaŭ sen kontraŭvoĉo. Statutkonforme ankaŭ la ĜA ratifikas - unuanime - la simbolan kotizon deciditan de la Senato ekde 1988.

4. *(Starigo kaj aktualigo de la regularoj)*

La ĜA aprobas la koncernan (daŭrigotan) laboron de la Senato kaj decidas unuanime:

*Por kontribui flanke de AIS al la Jubilea Jaro de la Internacia Lingvo la regularo pri kunsidoj enhavu la preskribon, ke estonte la Ĝenerala Asembleo (Ĝ) same kiel jam ĝis nun la Senato uzu kiel ununuran laborlingvon ILon. Kie en aliaj kunsidoj (de la SubS aŭ de la SciS) pluraj oficialaj lingvoj estas uzataj kaj tradukoj okazas, ĉi tiuj okazu nur en la Internacian Lingvon.*

5. *(Plifirmigo de la pozicio de AIS)*

Oni petas la sanmarinajn estraranojn kaj komitatanojn de la SubS zorgi pri tio, ke dum SUS 4 eblos publika prezentado de AIS al la loĝantaro de RSM (plej bone fare de la Vicprezidanto, itallingvano OProf.Pennacchietti).

La ĜA decidas unuanime:

*La aŭtoritatoj koncernataj de RSM estas petitaj kontaktiĝi kun la urba biblioteko cele starigon de sekcio kun scienca literaturo, al kiu AIS povos disponigi siajn sciencajn librojn ĝis kiam eventuale AIS havos la eblon mem starigi bibliotekon. - La SubS estas petita disponigi al la urba biblioteko personan helpon se tio necesas por administri la starigotan sciencan sektoron.*

ASci. Colombin informas, ke ŝi havas bibliotekistajn spertojn kaj eventuale povus helpi.

Unuanime la ĜA rezolucias:

*Konstatinte ke la unua diskuto pri la starigo de AIS en SanMarino okazis post prelego de la nuna prezidanto en la Kongresa Palaco pri la Lingvo-Orientiga Instruado,*

*rigardante, ke tiu pedagogia eksperimento ne nur sukcesis sed ankaŭ kondukis al la regula instruado de la Internacia Lingvo por propedeŭtikaj celoj en elementaj lernejoj de diversaj landoj (ekz. jam dum jaroj en Namur/Belgio)*

*kaj uzante la eblon nun ekzistan, jam en la elementaj lernejoj de SanMarino komenci la instruadon de fremdaj lingvoj,*

*la ĜA petas la Dikasteron pri Klerigo kaj Kulturo, dum ĉi tiu Jubilea Jaro de la Internacia Lingvo enkonduki en almenaŭ unu elementan lernejon de SanMarino la Lingvo-Orientigan Instruadon kaj konfidi al AIS la sciencan observadon.*

Marina Michelotti substrekas, ke la koncernata deputito, Fausta Morganti, apartenas al la estraro de ILEI, organizo, kies oficiala sidejo estas en RSM kaj povos helpi la realigon de la projekto. Kun granda aplaŭdo oni subtenas la averton eviti en RSM la ripeton de la diverslande spertita fiasko de tro frua ekinstruado de la angla lingvo.

La ĜA unuanime ratifikas la interkonsentojn pri reciproka helpo kaj agnosko kun SAT kaj ORE. Oni esperas, ke pluaj tiaj interkonsentoj estos pretaj por ratifiko dum la ĜA en septembro 1987.

Post mallonga diskuto pri la decido de la Senato nomumi komisiitajn estraranojn de la SubS oni kontraŭ tri voĉoj aprobas la senatdecidon, sed substrekas, ke nepre en la septembro la SubS mem statutkonforme zorgu pri kompleta estraro kun elektitaj vicestraranoj.

6. *(Diversaĵoj)*

Sen per tio samopinii pri la ĝenerala taŭgeco de la simbolo aŭ emblemo de AIS loke proponita oni akceptas ties uzadon kie tio decas.

La Prezidanto informas, ke la Senato decidis honorigi apartenantojn elstarajn fake, homece, agade kaj subtene. Li anoncas la publikan honorigon de la ĉeestantaj subtenaj membroj Miriam Michelotti kaj Piera Raffo Federici per agnosko de la honora bakalaŭreco kaj de la ĉimomente en Panama por AIS aganta estrarano de la SubS Dr.Klemm per agnosko de la honora doktoreco. La laŭdadoj de ili (kaj eventuale de aliaj) okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 4. -

Offizielle Bekanntmachung

*Tuj post la fino de la kunsido la ĉeestantaj estraranoj kaj komisiitaj estraranoj de la SubS retiriĝas al mallonga kunveno en la ĉeesto de la Prezidanto kaj ratifikas ankaŭ siavice la statuton kun apendico. 12:15 alvenas advokato Busignani, informiĝas ke per tio ĉiuj organoj de AIS ratifikis la statuton en la formo jam aprobita de la Konsilio de la XII, tiel ke la subskribo kaj ekfunkciigo povos okazi 1987-05-02 en lia oficejo.*

Ines Ute Frank
Protokolantino

OProf.Dr.Frank
Prezidanto

---

*Decidoj de la Estraro de la Subtena Sektoro*

La estraro de ls Subtena Sektoro aprobis 1987-04-04/1686pfR dum mallonga kunveno la statuton kun apendico, kiun antaŭe estis ratifikinta la Ĝenerala Asembleo.

Dum dua kunveno 1987-04--14/1686pfR en Paderborn la estraro elektis ADoc. Dr.G.Klemm kiel vicdirektoron kaj Ines Ute Frank kiel Estraran Sekretarion. - Dr. Klemm disponigos juran ekspertizon (en formo reduktita al la precipaj alineoj), kiu konstatas, ke la sciencistaj gradoj kaj titoloj agnoskitaj fare de AIS estas agnoskeblaj en FR.Germanio, por la traktadoj pri la tiulanda agnosko de la rezultoj de la adaptaj adoptoj. - La estraro petas la Senaton enkonduki atestar-libron, kiu enhavu la kursatestojn kaj sciigon pri agnoskitaj studadoj en aliaj studejoj. La Senato krome estas petata starigi interkonsentojn tempe limigitajn kun privataj studejoj, en kiuj almenaŭ tri efektivaj aŭ adjunktaj apartenantoj de AIS regule instruas universitatnivele, por ebligi la agnoskon de tiea studado por la kandidatiĝo kadre de kursarplano de AIS; la repondeco por la ekzameno restu ĉe AIS.

*Oficialigaj kunvenoj en San Marino*

Reprezentantaro de la iama Iniciatgrupo por la fondo de AIS subskribis sabaton, 1987-05-02 en la oficejo de advokato Busignani en San Marino la mallongigitan, aprobitan statuton kaj formale alvokis la profesorojn Chen, Frank, Lansky, Muzic, Neergaard, Pancer, Pennacchietti, Popovic kaj Weltner kiel unuajn efektivajn membrojn. La tiel realvokitoj, de kiuj pli ol la duono (Frank, Lansky, Pancer, Pennacchietti, Weltner) persone ĉeestis, tuj kunvenis surloke en la ĉeesto de advokato Busignani al ekfunkciiga Ĝenerala Asembleo kaj formale reelektis la Senatanojn Chen, Frank, Neergaard, Pancer kaj Pennacchietti en la Senaton. Poste ili elektis kiel revizorojn la subtenajn membrojn Salvatore Argentino (I), Ingrid Klemm (D), kaj - kiel anstataŭantinon - Alberta Gherardi Balsimelli (RSM). - La jam reelektitaj senatanoj, de kiuj la kolegoj Chen kaj Neergaard estis skribe akceptintaj la elektitecon kaj transdonintaj sian voĉdonrajton, en la ĉeesto de la advokato tuj (formale re)elektis por la jaroj 1987-1990 la kolegojn Frank kiel prezidanton kaj provizoran trezoriston, Pennacchietti kiel vicprezidanton kaj Pancer kiel Sekretarion.

La saman tagon en la ĉeesto de la efektivaj membroj Lansky kaj Weltner kiel gastoj, la Senato kunsidis en la hotelo La Grotta kaj aprobis unuanime la apendicon al la statuto decidita anticipe de la laŭjure „provizora“ Ĝenerala Asembleo la 4an de aprilo 1987; la apendico rolu kiel kadro de la starigota regularo laŭ artikolo 11, lasta alineo, de la Statuto. Krome la Senato decidis, ke estu plenrajtaj membroj, t.e. efektivaj membroj elekteblaj en la Senaton,

a) ĉiuj 9 unuaj efektivaj membroj samtage elektitaj fare de la subskribintoj de la Statuto,
b) la ĝisnunaj aliaj plenrajtaj membroj.

La Senato konfirmis la rangon „Asociita Profesoro“ de la aliaj ĝisnunaj profesoroj de AIS. Same la Senato konfirmis la rangon „Plenrajta Docento“ al ĉiuj kolegoj, kiuj havis ĉi tiun rangon jam antaŭe sen tempa limo ĉe AIS.

La protokolitaj, ne intertempe ŝanĝitaj decidoj de la „Fondo-Senato“ , t.e. de la Senato, kiu laboris laŭ la provizora (la fondo-) statuto de 1986-09-13, validu.

Kiel Subtenajn Membrojn la Senato akceptis ĉiujn ĝisnunajn subtenajn membrojn, kiuj jam pagis la kotizon por 1686pfR. - Ĝis nova elekto okazonta dum SUS 4 deĵoru la ĝisnuna estraro de la SubS komisiite.

La Senato aprobis la interkonsenton pri reciproka helpo kaj agnosko kun la Itala Esperanto-Federacio kaj decidis, ke AIS serĉu oficialajn kunlaborinterkonsentojn kun (precipe sciencaj) institucioj ankaŭ en la Respubliko de San Marino, kaj petis siajn sekciojn realigi taŭgajn kontaktojn kaj vortigi la interkonsentojn.

De 15:00 ĝis 15:15 h samloke denove kunvenis la ĜA, unuanime ratifikis la statut-apendicon, formale (re-)elektis Muzic kaj Popovic en la Senaton, ratifikis la interkonsenton kun Itala Esperanto-Federacio kaj aprobis la proponojn de la Senato kaj de la provizora estraro de la SubS, fari kunlaborinterkonsentojn kun sciencaj institucioj instruantaj universitatnivele en ajnaj landoj de la mondo. - La ne intertempe ŝanĝitaj decidoj de la „provizora“ ĜA, protokolitaj ekde la „provizora“ fondo de AIS (1986-09-13) estas validaj.

Außerhalb der redaktionellen Zuständigkeit

## Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a“, „b“ usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a“ etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1“ usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild“. – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers“ dieser Sprachen zu benutzen.

## *Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj*

*Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.*
*La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a“, „b“ ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a“ ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1“ ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon“. – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).*
*Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.*
*Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.*

## Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

## *Forme des manuscrits*

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.